ĈEA-retkomunikoj 2/2005

CxEA-retkomunikoj estas neregula reta informservo por la membroj de CxEA kaj por cxiuj ceteraj esperantistoj, kiuj montris intereson pri la ricevado (senpaga). Gxi neniam enhavas aldonajxon. Se vi ricevis gxin pro iu eraro (pri kio ni petas pardonon) kaj ne deziras plian sendadon, bv. sendi simplan malplenan mesagxon per "Re" kaj temlinio "Ne plu sendadu".

Enhavo:

1. LA 11-a KONGRESO DE CxEHxA ESPERANTO ASOCIO
2. INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO 2005 (INPASEM2005)
3. CXEJ - CxEHxA ESPERANTO JUNULARO JURE EKZISTAS
4. EUxROPA TAGO DE LINGVOJ
5. NOVAJ E-LIBROJ APRINTAJ EN CxEHxIO
6. INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN NOVAJ EJOJ

1. LA 11-a KONGRESO DE CxEHxA ESPERANTO ASOCIO
okazos cxi-jare en Vyškov, ekde la 21-a gxis la 23-a oktobro. Dum la kongreso la partoprenantoj elektos novan asocian komitaton por la venontaj 3 jaroj. Pli detalaj informoj kaj la aligxilo aperis en Starto, n-ro 2/2005, eventuale vi povas ilin peti cxe cea.polnicky@quick.cz

2. INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO 2005 (INPASEM2005)
okazos de la 10-a gxis la 16-a de oktobro 2005 en la urbeto Dobřichovice apud Prago. Dum la semajno paralele okazos la kurso por komencintoj kaj la seminario por jamaj parolantoj. Pli da informoj kaj aligxilojn vi povas peti cxe info@kava-pech.cz, eventuale vi povas aligxi rekte cxe: http://www.kava-pech.cz/inpasem

3. CXEJ - CxEHxA ESPERANTO JUNULARO JURE EKZISTAS
Ni jam informis pri la ekaktivigxo de junaj esperantistoj. Ilia fonda kunveno kun elektoj okazis sur la pinto de Čantoryja 19.6. cxijare. Tie oni ankaux elektis trikapan komitaton: La prezidantino farigxis Dáša Chvátalová, vicprezidanto Marek Blahuš kaj kasisto Avinty Lanaikey. Sukceson en ilia por- kaj peresperanta agado!
Kiu deziras ekscii pli pri la agado de niaj junuloj bv. rigardi http://www.esperanto.cz/cej

4. EUxROPA TAGO DE LINGVOJ
estos la 26-a de septembro 2005. Cxi-okaze aperos en la jxurnalo PRÁVO la tutpagxa komerca anonco sub la titolo "Proč jsem vynalezl Walking Bag?" Gxin mendis kaj pagos japana entreprenisto Etsuo Miyosi. La anonco propagandos la inventajxon faritan de s-ro Miyoshi por handikapitoj, sed fakte multe pli da spaco gxi dedicxas al la propagando de Esperanto. Gxi estos konvena helpilo por cxiuj, kiuj volas propagandi Esperanton en Cxehxio.

5. NOVAJ E-LIBROJ APRINTAJ EN CxEHxIO

Jindřiška Drahotová memeldonis la kompilajxon LEGOLIBRETO II Temas pri kolekto de mallongaj tekstoj kolektitaj el diversaj fontoj, kiujn sxi redaktis kune kun Miroslav Vaněk. Pli da informoj kaj mendoj cxe drahotovaesperanto@seznam.cz

Esperanto-klubo en Brno eldonis la kolekton de prelegoj okazintaj en Brno la 4-an de decembro 2004 sub la nomo "Verda duopo Vondroušek - Schreiber" Redaktis Jan Werner. Pli da informoj kaj mendoj cxe malovec.starto@clavis.cz

En la eldonejo KAVA-PECH aperis lastatempe:

Leif NORDENSTORM: Arne, la cxefido
Alloga aventura evento okazinta en la 9-a jarcento en malgranda cxemara vilagxo en Svedio. La rakonto pri kelkaj amikoj el la vikinga tempo celas junajn legantojn kaj cxiujn sxatantojn de suspenso.

Chava PRESSBURGER: Taglibro de mia frato
Esperanta traduko de la taglibro de Petr Ginz, knabo devenanta el la praga jud-cxehxa esperantista familio. La libro priskribas travivajxojn de la knabo, kiu estis deportita dum la 2-a mondmilito al la koncentrejo Terezín kaj poste, en la jaro 1944, envicigita en la transporton al Auxsxvico. En la laste nomita koncentrejo li estis murdita kiel deksesjara knabo. La libro estas pruvo ne nur pri lia granda talento, sed ankaux pri lia aktiva esperantisteco. El la cxehxa tradukis Vlastimil Novobilský kaj Věra Novobilská.

Roman DOBRZYŃSKI: Zamenhofova ulice
Interesaj dialogoj de la auxtoro kun D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, nepo de L. L. Zamenhof kaj homo de la sortobatata vivo kaj kun multaj vivospertoj. R. Dobrzyński estas konata televida jxurnalisto kaj auxtoro de centoj da dokumentaj filmoj. Cxi tiun sian dekan libron li verkis en Esperanto kun la titolo "La Zamenhof-strato". La libro nun estas tradukita en plurajn lingvojn. El la esperanta versio gxin cxehxigis Jiří Patera.

kaj kelkaj fakaj libroj (el la brancxoj de esperantologio kaj terminologio kaj prelegkolekto pri intimaj temoj en E-beletro).

En preparo:

Petr CHRDLE - Stanislava CHRDLOVÁ: Esperantem za tři měsíce
Lernolibro de Esperanto por cxehxoj. La libro enhavos ankaux la partojn konversacian kaj por legado. Temos jam pri la tria pliampleksigita eldono!

Karel KRAFT: Heroo de amo - Vivo de Přemysl Pitter
Biografio de homo, kiu dedicxis sian vivon al la laboro por infanoj kaj gejunuloj de la malricxa socia tavolo. Tuj post la 2-a mondmilito li kuragxis kontrauxstari la maljustajxojn kiuj tusxis la germanajn kaj judajn infanojn. Post la stalinisma pucxo li devis forlasi sian

patrujon kaj li tiam gxis la fino de sia vivo helpadis al fugxintoj
el la sovetia bloko.

Kompletan oferton de la libroj de KAVA-PECH vi trovos sur la reta
adreso: http://www.kava-pech.cz

6. INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN NOVAJ EJOJ

Laux la direktoro de IEMW Herbert Mayer la Internacia Esperanto-Muzeo
en Vieno estas fermita cxisomere kaj en tute nova vesto gxi
remalfermigxos iam en septembro 2005 en Palaco Mollard (Herrengasse
9, A-1010 Vieno, Auxstrio). Ni gxojatendu la sxovon de la E-muzeo en
la novajn ejojn centre de Vieno kaj se eble multnombre vizitu gxin!